# La panoramo 2018 de Konsilio de Europo kaj ALTE pri lingva kaj socikona politikoj por migrantoj



EDUCATION FOR DEMOCRACY

ALTE
Association of Language Testers in Europe

1949.2019

COUNCIL OF EUROPE
CONSEIL DE L'EUROPE



## Bazaj tendencoj

- Dum la lasta jardeko pluraj membroj de la Konsilio de Europo (KdE) starigis formalajn postulojn pri lingva kaj socia kono kiel parton de siaj enmigra kaj integriga politikoj.

- La plejmulto fiksis tiujn postulojn kiam enmigrintoj petas la civitanecon. En duono de la membrostatoj la enmigrintoj bezonas trafi tiujn postulojn por rezidi – krome, en triono por eniri.

- Estas substancaj kaj fortaj diferencoj inter la specifa nivelo de lingvoposedo postulata inter la KdE-membroj.


- Vundeblaj grupoj (neadoltoj, mislokitoj, malkleruloj) malofte rajtas eviti testadon.

- Multaj KdE-membroj uzas testojn ne submetitajn al adekvata kvalitokontrolo. Tre malofte la trafo de la testoj sur enmigrintoj estas esplorata.


- La granda plejmulto de la KdE-membroj provizas lingvolernan eblecon por enmigrintoj, sed la provizita horonombro estas ofte malsufi¤a, precipe por vundeblaj grupoj.

## Postuloj kaj testoj

El la KdE-membroj sonditaj en 2018, 78% postulas lingvan kaj/au socian konon por la civitaneco. 17 procentoj ne havas tiajn postulojn kiel parton de sia enmigropolitiko:




Inter 2007 kaj 2018 pliaj landoj enkondukis pli da lingvaj (malhela bluo) kaj soci-konaj testoj (hela bluo) precipe por la civitaneco:




Lingvaj postuloj estas plejofte esprimitaj en KEFR-niveloj, sed estas malgranda unuformeco inter la niveloj postulataj por la sama celo tra la KdE-membroj.

# Lernebloj

Lingvokursoj por enmigrintoj estas ofte provizataj publike kaj kontrolataj kvalite. En la plejmulto de la kazoj, tamen, enmigrintoj ricevas ne pli ol 250 horojn da lingvoinstruado senpage:

**Horoj de senpaga lingvoinstruado**

| | Tuta lernantaro (n = 24) | Malklera lernantaro (n = 22) |
|---|---|---|
| 0 – 250 | 11 | 13 |
| 250 – 500 | 8 | 4 |
| 500 – 1000 | 4 | 2 |
| 1000 – 1500 | 1 | 2 |
| 2000 – 3000 | 0 | 1 |

Multaj KdE-membroj proponas kursojn pri socia kono, plej ofte nur en oficiala lingvo de la gastiganta lando.

Malmultaj KdE-membroj aparte atentas la vundeblajn grupojn, en sia integriga politiko. Por ne adoltoj, tre malmulte da lingvolernado ekster la deviga lerneja sistemo, kaj la specifaj bezonoj de mislokitoj kaj malkleruloj estas apenau konsiderataj.

## Rekomendoj

- Tial ke kursoj aspektas pli utilaj al integrigo ol testoj, lernebloj estu malfermitaj al la tuta gamo.
- Se testoj estas uzataj migrocele, ili trafu la plej altajn nivelojn de kvalito kaj justo.
- Difinante migran kaj integrigan politikojn, specifa atento estu asignata al vundeblaj grupoj.
- Pro homrajtaj kialoj, la uzo de antaueniraj postuloj por familia reunuigo estu forte malhelpata.

**El la 47 KdE-membroj, 40 partoprenis en la sondado 2018:**



La sondadon de KdE kaj ALTE gvidis:

- Lorenzo Rocca
  (Università per Stranieri di Perugia)
- Cecilie Hamnes Carlsen
  (Western Norway University
  of Applied Sciences)
- Bart Deygers
  (Ghent University)

Traduko:
Giorgio Silfer
(Esperanta Civito, Cité espérantienne)

Trovu la tutan raporton:
**www.coe.int/lang-migrants**
© Konsilio de Europo, 2019

PREMS 033920

ESPERANTO

www.coe.int

La Konsilio de Europo estas la gvida kontinenta organizo pri homaj rajtoj. Entute 47 membrostatoj, inkluzive de la tuta Europa Unio. La tuta KdE-membraro subskribis la Europan Konvencion pri Homaj Rajtoj, traktaton difinitan por protekti homajn rajtojn, demokration kaj  norman juron. La Europa Kortumo de Homaj Rajtoj supervidas la aplikadon de la Konvencio en la KdE-membroj.

COUNCIL OF EUROPE

CONSEIL DE L'EUROPE